

Ene de la internacia oftalmologia mondo jam dum longaj jaroj furiozas akraj diskutoj pri alternativaj metodoj por pritrakti katarakton. D-ro Schrader esperas surbaze de siaj esploroj konvinki la skeptikulojn. En tio lin subtenas alia okulisto, kiu - okaze de freŝdata vizito al la Afrika lando Burkina Faso - same estis atestanto pri la mirigaj efikoj de la mirakla rimedo.

D-ro Schrader intencas esplori, "kiuj elementoj el la ekstrakto efektivas la resaniĝon, kiel ni povos plibonigi la efikon kaj laste kiel konservi tiun kuracilon. Ni, finfine, certe sukcesos en tio. Tiam ni staros antaŭ la tasko eduke kapabligi gutistojn kaj instrui al ili, kiel ili almezuru okulvitrojn. Sed tio ja estas tute alia ĉapitro!"

### **Komputera aparato por frua diagnostiko de okulaj malsanoj (RETINOGRAF- 01)**

*R. Tkachuk*

*Ternopila politeknika instituto, Ukrainio*

La aparato servas por registrado de loka kaj ĝenerala elektra retinogramoj.

Ĝi aperigas fruajn detavoligon kaj abitrofion de retino, komencan distrofion en centraj partoj de retino kaj malsanon de 1-a kaj 2-a neuronoj, ĥorioretinan distrofion tipe Kunt-Junius, simpata inflamo. Krome, ĝi registras biopotencialoj dum nistagmo.

La aparato konsistas el: fotostimulilo, biopotenciala intensigilo, cifera transformigilo, vakua pnpilo, speciala aro de lensoj-elektrodoj, PEKM tipo de IBM PCAT kun programa provizado kaj informabazo.

Bazaj parametroj

Intenseco de luma stimulo, $\hat{j}$ uloj	0,085... 1,44
Ondolongo de stimulo de loka ERG um	0,63; 0,56
Frekvenco de stimula ripeto, hercoj	0,1... 30
Nivelo de bruoj alkonduktaj al eniro de intensigilo, uV	$\hat{g}$ is 3
Diapazono de mezuritaj signaloj, uV	0...500
Kvanto de eniraj kanaloj:	
diferencialaj	16
au pseudodiferencialaj	32
Tempo por aran $\hat{g}$ o de ACP, ms	20